

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

6. VII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1913.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)
(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = 1½ Sm.

Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezervas al si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 = 1½ Sm.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio Dresden-Bankejo Arnhold.)

Číslo 7. vyjde po prázdninách.

(Č. Č. E. ne aperas dum la libertempo.)

Doporučujeme všem přátelům dobré esperantské četby, aby obohatili svou knihovnu dosud vyšlými šesti ročníky „Časopisu Českých Esperantistů", které lze dostati za cenu sníženou: Roč. I., II., III., IV., V., po K 2·20 (pro členy B. U. E. po K 1·70), roč. VI. za K 2·50 (K 2·20). **Příloh bez časopisu nelze obdržeti.**

INFORMO KAJ AVERTO!

Honesta laboro? Kie ajn aperas sukcesa rezultato de nia propagando, ĉien provas enpenetri precipe en vicojn de la nove gajnitaj samideanoj eksesperantistoj aŭ s-o Kajš aŭ s-o Khun, kiuj estas kolonoj de la ido-reformista movado inter Bohemoj (krom s-o Chaloupecký, parazito sur la korpo de la soc.-dem. organizaĵo e s p e r a n t a). Ne povante trovi inter la vasta bohema publiko intereson por sia ĉ i a m pliperfektigata „reformita Esperanto“ (tian nomon ili donas al Ido por trompi la publikon!!) ili serĉas laborkampon inter la Esperantistoj — sed laŭmerite, ankaŭ sen ia sukceso. La tuta idistaro estas kalkulebla sur fingroj. Por entrudi sin en la esperantistan societon, ili akompanas siajn presaĵojn per esperantaj leteroj; sed kia ĝi estas stilo! Jene konsilas s-o Kajš: „Ne disipu (?) vane viajn fortojn (per lernado de Esperanto): la fanatikuloj insultis nin, sed nun li (!) vidas vaneco (!) de ilia (!) furio (?), kaj preferas silenti.“ La konsilo ne trovas aŭskultantojn — la leteroj pereas en korboj. — Se kelkaj redakcioj, avidaj pri „sensaciaĵo“ kaj supraĵe legantaj, ne akceptus iam artikolon de iu idisto (ofte titolitan „E s p e r a n t o reformita“!!), neniu parolus plu pri tiu ĉi arte vivigata kadavro, kiun patronas s-o Ostwald per kaj pro sia nomo kaj per sia mono. Sed ankaŭ en tiu ĉi rilato unufoja sperto instruas la redaktorojn, se ili estas de siaj legantoj informitaj pri la situacio, ke la subfosa idista movado ne meritas ilian atenton.

EL „VOĈOJ DE 30 POPOLOJ“.

(Nia tre bone konata samideano Antoni Grabowski el Warszawa disponigis al ni la sekvantajn tri poemojn, kiuj aperos baldaŭ en lia nova verko enhavonta 110 poemojn tradukitajn el tridek lingvoj.)

PRINTEMPA KANTO. *(El J. Vrchlický.)*

Flirtis alaŭd' el sekalo
Ĝojante,
El griza, nuba vualo
Ŝutas perlaron kante.

Kaj ĉiu tono arĝente
Sonoras.
Tero aŭskultas atente,
Burĝonojn divenas sente,
Per freŝa ŝlim' odoras.

TRI AMATINOJ. *(Slovena kanteto.)*

El amatinoj tri
Ĉiu gracia,
Arĝenton havas ŝi
Oron alia.

Ringeton havas ŝi
Perlojn alia,
Korsaĵon sur tali'
Portas la tria.

Plej junan prenus mi
Ĉiam prefere,
Ĉar amas tiu ĉi
Min plej sincere.

KONSOLO. *(El S. Hurban Vajanski.)*

Logis min ĉe l' amatino
Griza okul-paro,
Sed ŝi poste kun ĉasisto
Iris al altaro.

Longe ploris mi maldolĉe
Ploris senkonsole,
Ke la griza okulparo
trompis min petole.

Nun vidante, ke malbona
Estas ŝi edzino,
En kanteto la konsolon
Trovas mi en fino.

Dum edzino, la pekema,
Edzon nun turmentas,
Vi pro tiu ĉi kanteto
Koramuzon sentas.

SKLAVO.

Skizo el la vivo de Petro Paŭlo Rubens. Kun permeso de la aŭtoro M. Walter tradukis Kamilla Fürth.

Kiam revenis venkinta kaj glorplena la hispana admiralo Faréja, kiu laŭ la ordono de Filipo IV. entreprenis militiron al Sud-Ameriko, la reĝo intencis lin speciale honorigi. Tial li ordonis al sia favorato, la fama konata pentristo Velazquez, ke li pentru portreton de la admiralo. Faréja estis tiom ravita de la simileco kaj la genia maniero de la pentrado, ke li vizitis la faman artiston kaj donacis al li mirinde belegan oran ĉenon, alportitan al li en kesteto de juna mulato, kiun li kunprenis el Ameriko.

Kiam forlasis Faréja Velazquezon, la sklavo volis sekvi sian sinjoron, sed tiu ĉi malafable lin repuŝis per la piedo, vokante: „Sklavhundo, kune kun la ĉeno mi fordonis ankaŭ vin. De nun vi apartenas al sinjoro Velazquez". Tiamaniere la mulato fariĝis propraĵo de la pentristo, kiu lin afable traktis, komisiis al li la purigadon kaj disfrotadon de la farboj. Dum la foresto de la majstro la lernantoj de Velazquez faris la mulaton objekto de siaj mokoj kaj petoloj. Juano, al kiu oni donis la nomon de Faréja, lia estinta sinjoro, dum longa tempo toleris la pli-malpli ofendajn incitetojn kun stoika pacienco; fine por liberiĝi de ili, li sin kaŝis en apuda ĉambreto dum sia libera tempo. Tie li sentis sin neĝenata kaj por pasigi la tempon, li komencis desegni kaj kopii, kion li vidis en la pentrejo Tiam ofte li observis kaj aŭskultis la instrukciojn kaj konsilojn de la majstro, ke ne malfacile estis por li riski la provon. Kvankam restis al li nur la eluzitaj penikoj kaj farborestoj de la lernantoj, tamen la dormetinta talento en li faris vojon al si, malgraŭ la nesufiĉaj helpiloj. Kaj li tiom sekrete sin okupis pri la studado, tiom malmulte li elmontris sian komprenon pri la arto, ke nek Velazquez, nek liaj lernantoj ion rimarkis el lia laboro.

Unu matenon regis granda ekscito en la pentrejo. Juano purigis kaj balais, sternis la tapiŝon kaj helpis starigi la finpenritajn bildojn. La lernantoj estis plennombre kunvenintaj, feste vestitaj kaj videble ekscititaj, ĉar sin anoncis altrangaj vizitantoj. Unu el la anoncitaj vizitantoj estis la reĝo, sed tiu ĉi venis sufiĉe ofte, tiel, ke lia sola apero ne povis naski tian maltrankvilon. Sed la alia gasto! Li ankaŭ estis reĝo — majstrego de la arto, la plej fama pentristo de sia tempo — Petro Paŭlo Rubens.

Lia famo disvastiĝis tra la tuta Eŭropo, kaj la princoj de ĉiuj landoj konkuris ŝuti honorojn sur la geniulon, por akiri verkon de lia peniko. Certe, malofte kuniĝis tiom da talento kaj da eminentaj ecoj en unu homo, kiel en Rubens. Havante imponan eksteraĵon, noblan, dignoplenan karakteron, li estis kalkulata ne nur inter la plej famajn pentristojn de sia tempo, sed oni altŝatis lin ankaŭ kiel eminentan oratoron kaj saĝan diplomaton. Li parolis sep lingvojn, konstruigis por si multe admiratan palacon laŭ siaj propraj planoj kaj mem projektis la konstruplanon de la Jezuita preĝejo en sia hejmurbo Antwerpen.

Kiam la reĝo kun sia sekvantaro eniris la domon de Velazquez, ankaŭ Rubens aperis akompanata de siaj lernantoj, Van Dyk kaj Suyders. Respektplene li salutis la monarĥon, kiu senceremonie ŝovis sian brakon sub tiun de la artisto kaj diris ridetante: „Tie ĉi ankaŭ vi estas reĝo, ĉar ni troviĝas en la domo de pentristo."

Ĉe la enirejo de la pentrejo Velazquez afable akceptis siajn gastojn kaj petis ilin, rigardi la starigitajn pentraĵojn.

Rubens detale rigardis la verkojn de sia hispana kolego, esprimante al li sian kontentecon kaj admiron. „Tiu ĉi tago estas la plej feliĉa en mia vivo," respondis Velazquez la laŭdon de la glora, flandra majstro, „ĉar la tuta famo valoris nenion por mi tiel longe, dum mankis al mi aprobo de Rubens". Poste li tuj esprimis la deziron, ke lia gasto lasu al li iun memoraĵon okaze de tiu ĉi vizito, desegnante malgrandan skizon sur la tolo, aŭ farante per peniko kelkajn strekojn sur iu ajn pentraĵo.

Rubens konsentis volonte, kaj preninte penikon kaj paletron en la manon, li rigardis ĉirkaŭen por elekti bildon, ne ankoraŭ finpentritan.

Ne trovinte iun taŭgan inter la elmetitaj bildoj, li ekprenis tolon apogitan surface kontraŭ la muro. Sed rimarkinte, ke tio estas finpentrita bildo, li pli detale ĝin rigardis, aŭdiginte ekvokon de mirego. La bildo prezentis la entombigon de Kristo. Juano pentris ĝin sekrete, kaj la saman matenon, antaŭ ol venis la lernantoj, alportis en la laborejon por fari la lastajn strekojn. Pro la ekscito li forgesis ĝin reporti en sian ĉambreton. Tremante li nun staris en angulo de laborejo, ĉar li timis la riproĉojn de sia sinjoro kaj la mokon de la lernantoj, se malkaŝiĝus lia sekreto.

„Mi pensis", diris Rubens sin turnante, „ke vi mem pentris tiun ĉi bildon, sinjoro, sed post pli atenta ekzameno mi vidas, ke ĝi supozeble estas laboro de iu el viaj lernantoj. Certe iu tre kapabla, kiu sendube fariĝos majstro de sia arto, ĉar malgraŭ la mankoj li evidente havas genian talenton". Juano preskaŭ ne kredis, kion li aŭdis. Li, la mizera, malestimegata, laŭdire havas talenton, estas pentristo, al kiu montris aprobon la eminenta Rubens? „Mi efektive ne scias, kies verko tio estas", rediris Velazquez, rigardante kun mirego la pentraĵon. „Mi neniam antaŭe vidis ĝin, kaj mi ne kredas, ke iu el miaj lernantoj, kiom ajn talentaj ili ankaŭ estus, kapablus krei tian verkon.

Li do sin turnis al la junuloj kaj demandis: „Kiu pentris tion?" Neniu respondis. Jen la rigardo de Velazquez trafis la mulaton. „He, Faréja" vokis li, „ĉu vi eble scias tion?" Juano proksimiĝis pala kaj tremanta kaj sin ĵetante al la piedoj de sia mastro, li konfesis, ke li pentris la bildon. La mirego de ĉiu estis granda.

Rubens gratulis lin, kaj Velazquez sin proponis por pliperfektigi lin. Reĝo Filipo metis afable la manon sur la ŝultron de la radianta pro feliĉo. „Artisto, favoregata de Dio ne devas esti sklavo", diris li gajmiene.

„Eklevu vian kapon, vi estas libera. Mi elaĉetas vin de via sinjoro per 200 dublonoj. (Antikva hispana monero = 10 Sm.)

„Tiuj ĉi 200 dublonoj apartenu al vi, Faréja“, aldonis Velazquez. „De nun rigardu min, kiel vian amikon.“

De tiu ĉi horo Faréja estis nedisigebla kunulo de sia ĝisnuna sinjoro. Kiam tiu ĉi mortis de epidemio en la jaro 1660, la fidela mulato flegis lin ĝis lia morto.

Dek jarojn poste li savis, sin mem oferante, la vivon de Martinez de Mago, la bofilo de Velazquez, lerta pentristo de pejzaĝoj. Pro venĝa atako de malamiko la kavaliro Martinez de Mago tiame estus perdinta la vivon, se ne Faréja sin estus ĵetinta inter lin kaj la mortiganton; tiel la pereiga puŝo trafis lian propran bruston. La Madrida muzeo posedas nombron da bonaj pentrajoj de Faréja. Lia plej eminenta verko „la elekto de Mateo“ sin trovas en la reĝa palaco de Oranjuez.

IOM DA INSTRUO.


Takoma havas komercajn rilatojn kun la tuta mondo kaj sekve ĝia haveno estas tiel vasta kaj profunda, ke ĉiuj batalŝipoj de la mondo povus en ĝi ankrostari. Mirinda estas la akvo de la golfo Puget Sound: blua kiel Mezmara ĉielo kaj ofte klara kiel kristalo. Vi trarigardas ĝis cent futojn, kie la smeraldaj kreskaĵoj moviĝas sur la fundo kaj amaso da fiŝetoj bluaj kaj brunaj kaj flamruĝaj naĝas super ŝtonetoj kaj konkoj. Per vaporŝipoj oni povas viziti multe da najbaraj urboj, el kiuj la plej granda estas Seattle. . . . La arbegoj de Takomo estas mirindaĵo de la mondo; estas tie arboj, kiuj estis plenkreskuloj, kiam Kolumbo eltrovis Amerikon kaj ankoraŭ ili estas tiel fortikaj, ke ili povos stari dum centoj da jaroj. La arboj estas rektaj kiel kudrilo kaj tiel perfektaj, ke el la pli malgrandaj oni faras mastojn kaj telegrafstangojn.

La urbo estas, rilate la komercon, vera abelejo. Dek mil homojn okupas 419 fabrikoj; fabrikaĵoj de dek muelejoj, de granda vagonfabriko kun 1200 laboristoj kaj de la tutmonden eksportantaj lignosegejoj rilatigas Takomon kun ĉiuj partoj de la mondo. Ĝia havena grenejo estas unu mejlon (1600 m) longa. Impona estas la konstruaĵo de la Alta Lernejo (2000 studentoj kaj 67 profesoroj), kiu leviĝas super vasta amfiteatro. Tiu ĉi estis antaŭ kelke da jaroj elsorĉita el natura senutila valo kaj nun trovas en ĝi sidlokon eĉ sesdek mil rigardantoj; la areno estas pli ol sufiĉe granda por ĉiuj sportoj. Krom sep privataj akademioj kaj lernejoj estas en la

urbo tridek publikaj lernejoj kun 14.000 lernatoj kaj 2000 instruistoj. — Pri la hejma vivo la Takomanoj povas prave fieri: riĉaj same kiel la malriĉaj en ĉiuj kvartaloj de la urbo posedas propran hejmon.

Scienca revuo.

Senfadena telefonio estis ĵus realigita de itala prof. Vanni je distanco de pli ol 1000 km inter Roma kaj Tripoli. La ĉefa malfacilaĵo konsistis el tio, ke en la telefonio oni devas transsendi ne intermitajn ondojn, kiuj respondas al konvenciaj signoj, sed la vibradon mem de la parolo kun ĝiaj diversaj karakterizaj sonkoloroj; sekve devas la transsenda aparato enhavi generatoron naskantan persistajn ondojn kaj variigilon, kiu povas variigi la elektromagnetan radiaĵon de la anteno laŭ la moduloj de la voĉo. Por sia laboro uzis Vanni akvan generatoron, kiu konsistas el du kupraj elektrodoj (sub 600 voltoj) el kiuj la malsupra (B +) estas borita. Tra la trueto ŝprucas la elektrigita akvo sur la alian elektrodon La rondfluo, komunikanta kun la anteno ktp. estas variigata laŭ la moduloj de la voĉo aŭ sono per hidraŭlika mikrofono. Tiu ĉi lasta aparato bazas sur la kurioza propreco de likva ŝpruco, kiu prenas ĉe elfluado diversajn formon kaj kvaliton. Sono produktita apud tia ŝprucvejno transformas ĝin je gutoj kaj la diafana parto de la vejno mallongiĝas (hidrodinamika rezonanco). Se la mikrofono (Z), en kiun oni parolas, estas kunigita kun unu el du lamenoj (E, F), super kiuj fluas la ŝprucvejno, ĉi tiu ŝprucvejno ricevas vibrojn de la vibra lameno kaj — estante en elektra flurondo, variigas pro sia aliformiĝado la elektran rezistecon de la fluo periode laŭ la moduloj de la sono produktata antaŭ la mikrofono. Sekve, se la sistemo de tiuj du lamenoj estas metita en la rondfluon anteno-tero, tiu ĉi rondfluo estas trairata de elektraj fluoj periode variantaj laŭ moduloj de la sonoj.



(Legu detalaĵojn en la „Scienca Gazeto“, internacia monata revuo pri scienco kaj industrio, of. org. de Int. Scienca Asocio Esperantista. Red. Ch. Verax. Adm. Hachette & Cie, Paris. Jare Fr. 7·50. La gazeto estas tre rekomendinda, prezentante en formo facile komprenebla novaĵojn el la scienca mondo.)

INFORMOJ PRI LA BOHEMA NACIO.

La nacia defendo. Destino de ĉiuj malgrandaj nacioj estas, ke ili devas eĉ al sia leĝe garantiata rajto havigi valoron per klopodoj kaj kontraŭ furiozeco de siaj subpremantoj. Se estas ekz. mezurate al bohema majorito loĝanta en pli granda parto de Bohemujo kaj preskaŭ ekskluzive en la ĉefurbo Praha almenaŭ iom laŭleĝe, tiom pli fanatika estas konduto de la ŝtataj oficoj kontraŭ la bohemaj minoritoj, kiuj devas ĉiupaŝe suferi premon de la aŭstria germaniga brako. En ĉiuj sferoj de la vivo ili renkontas maljustaĵojn, same en la vivo societa kiel en la ofica. (Ekz. forpelado de boheme sciantaj fervojistoj, eksdungado de bohemaj laboristoj kaj ilia elpelado el loĝejoj, konfiskacioj, multloka fermado de bohemaj lernejoj p r i v a t a j, ofta rifuzo de laŭleĝa uzado de lingvo bohema ĉe la ŝtataj oficoj en la minoritaj teritorioj ktp. ktp.). Precipe hontiga estas por tia sistemo de ŝtata administrado la daŭra ignorado de la klerigaj institutoj bohemaj, kiujn fondadi, malgraŭ la fundamentaj leĝoj, ĝi ne volas, timante la germanan ŝovinismon. Kvankam la landaj kaj aŭtonomiaj korporacioj senpartie plenumas siajn devojn rilate ambaŭ naciojn, tamen la ŝtato — en la lokoj, kie loĝas m i n o r i t o bohema — lasas Bohemojn kiel viktimon de la germana perforto. Jen la motivoj, kiuj rezultigis fondiĝon de niaj naciaj sindefendaj societoj, kies celo estas fondadi kaj subtenadi bohemajn lernejojn en tiuj lokoj (loĝataj de minorito bohema), kie la ŝtato intence ne plenumas sian devon, lasante liberan manon al la germanigaj kapricoj de la kelkaj tie regantaj ŝovinistoj, helpataj de la konata renegatiga Schulverein. La nomitaj societoj, en kies frunto staras „Ústřední Matice Školská“, laboras por Bohemujo norda kaj sudokcidenta, por Moravio sudokcidenta kaj nordorienta, por Silezio, Wien ktp.; ĉiuj dokumentoj pri ilia laboro estis kolektitaj de la „Minorita Muzeo“ kaj estas nun elmontrataj en ekspozicio (Praha), kiu elokvente pruvas la signifon de niaj minoritoj kaj la meritoplenan helpon de la favoraj subtenantoj. Kaj ĉi tiu ekspozicio de sekaj ciferoj, en kiuj estas kaŝitaj jaroj da pena nacia vivetado, da subpremado, senfortiga batalo kaj senekzempla oferemo, senprofitemo kaj sinforgeso de la bohema nacio, prezentas al la vizitanto krudan historion, doloran historion de nia defendo kontraŭ la germana kaj magiara ŝtata premo, ĝi vidigas la entuziasmon kaj oferemon de la antaŭaj generacioj, ĝi kaŭzas profundan korpremon kaj emocion, kiu akompanas ĉiun sinceran donacon destinitan por celo nobla. Interesaj diagramoj el fundamento korektas la „oficialan“ falsitan popolsumigadon el 1910. Kelkaj el la societoj elspezis — por savi la boheman infanon el brakoj de la renegatiga moloho — centmilojn kaj milionojn da kronoj oferemе donacatajn de la sinceraj Bohemoj. Ne tro vasta sed tre instrua estas la bildo prezentata de „Ústřední Matice Školská“, kiu dum sia 32-jara ekzistado kolektis kaj elspezis pli multe ol 14 milionojn da kronoj por konstruado kaj subtenado de la minoritaj lernejoj, kies ĉiutaga budĝeto estas 3300 K! Kiun ne tuŝas la cititaj ciferoj kaj bildoj montrantaj la suferojn de niaj minoritoj, tiu ekmeditu antaŭ la modelo de bohema privata lernejo „Komenský“ en Wien III.: la palaco, al ni apartenanta, por niaj infanoj konstruita, estas ĝis hodiaŭ sigelfermita laŭ ordono de furiozanta ŝovinista kristansociala magistrato viena, kiu nepre eĉ per faroj kontraŭleĝaj volas

malebligi, ke la bohemaj infanoj estu instruataj en sia gepatra lingvo bohema. En Wien estis, oficiale (!!) kalkulite, trovitaj 236.600 infanoj germanaj kaj 14.546 bohemaj. Por la germanaj estas tie 512 publikaj krom 47 privataj lernejoj. Por la bohemaj — eĉ ne unu publika kaj sole 4 privataj, kvankam la leĝo ordonas konstruon de 43 bohemaj lernejoj. Sed — perforto venkas la rajton...

Kaj kia diferenco estas inter la lernejoj de „Matice" kaj tiuj de „Schulverein", iu el la legantoj eble demandos. Tia diferenco, ke „Matice" laboras inter bohemaj minoritoj sole por doni al iliaj infanoj eblecon kleriĝi en la lingvo gepatra (— en ĝiaj lernejoj estas eĉ ne unu germana infano! —) sed Schulverein, flatata de la germanigaj ŝtataj tendencoj, celas renegatigi la bohemajn infanojn; en ĝiaj lernejoj mortas intelekte m i l o j da infanoj bohemaj, kies gepatroj, dependante de germana mastro aŭ pandonanto, devas toleri renegatigon de siaj infanoj, se ili ne volas esti eksdungitaj kaj elpelitaj. Kaj super ĉi tia justeco regas la devizo „Justitia regnorum fundamentum"! Silentu pri tiaj faktoj — vi, kiuj ne havas koron aŭ kiuj perdis jam la senton por justeco.

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

(El Denis): Ferdinand dříve než podepsal nálezy smrti, poradil se se svými obvyklými rádci. Odsouzenci svou horlivostí pro víru, svými službami a svou slávou byli „květ národa našeho, svíce a podpory vlasti"; byli mezi nimi znamenití právníci, vynikající spisovatelé, proslulí politikové; popravit je bylo tolik jako zbavit Čechy koruny, vzbudit nezahladitelné zášti, vyhloubit mezi národem a dynastií příkop krvavý. Jediný dvorní rada říšský Strahlendorf doporučoval udělení milosti větší měrou. Mnoho stoupenců Ferdinandových dychtilo po dědictví odsouzených, kardinál Ditrichštajn snažně prosil císaře, aby se nelekal poprav potřebných. Ferdinand po noci plné úzkosti napsal svou závěť, jež překypovala mystickou zbožností, potom podepsal rozsudek smrti nad 27 odsouzenci; pak se vydal do Mariazellu, aby obětoval zázračné panně Marii zlatou korunu v ceně 10.000 zlatých. (*Překlad viz v č. 7.*).

La reĝoj kaj la vero. La roma imperiestro Tiberius eraris iam en la parolo kaj gramatikisto Marcellus lin atentigis pri tio. Sed alia scienculo Publius Capito aldonis: „Ĉio, kion, diras imperiestro, estas bona latina lingvo, aŭ fariĝos baldaŭ tia". Sed Marcellus serioze proklamis: „La romanan civitan rajton povas doni la imperiestro al homoj, sed ne al vortoj". — Sed ankaŭ imperiestro Zikmund arogis al si tian rajton. En la latina parolado, kiun li eldiris en la j. 1415 ĉe la eklezia konsiliĝo en Konstanz, li uzis la vorton „skismo" en sekso virina. Unu monaĥo lin atentigis, ke tiu ĉi vorto estas neŭtra. „De kiu vi scias tion?" „Aleksandro Gallus tiel diras." „Kiu estas Aleksandro Gallus?" „Scienculo". „Nu, mi estas imperiestro, tial mi estas prava!" — Tiel opiniis unkaŭ aliaj reĝoj kaj imperiestroj, ke ili venkobatos la veron eĉ tie, kie ĝi havis pli grandan signifon ol ĉi tie. Sed „skismo" restis neŭtroseksa malgraŭ la volo de Zikmund, kaj vero restos vero eĉ se ĉiuj imperiestroj kaj reĝoj leviĝadus kontraŭ ĝi."

KVINPINTA STELO.

Por desegni esperantan signon, oni ofte troviĝas embarasata, provante dividi la cirklon je kvin partoj. Jen estas konstrumetodoj de pentagono, kiuj trovos certe aplikon ĉe laboroj de pli ol unu el niaj legantoj.




Fig. 1. Desegnu cirklon per radio *AB* kun perpendikularaj diametroj, duonigu la radion (*AC* = *CB*), kunigu punktojn *CD* per rekto kaj transportu sur ĉi tiun rekton la longon *CA* (centrigante en *C*). Vi ricevos punkton *E* Centrigante en *D*, transportu la longon *DE* sur la ĉefan cirklon: dekstre punkto *F*, maldekstre *G*, kiuj estas pintoj de pentagono.

Fig. 2. El punkto *C*, duoniganta la radion *AB*, desegnu per radio *CD* cirklon, kiu tranĉas la diametron en punkto *E*. Linio *DE* estas flanko de regula kvinangulo *DFGHI*.

Fig. 3. Se la bazo de pentagono estas donita per linio *AB*, oni procedu jene: Desegnu perpendikularon *CA* = *AB*, dividu duone *AB* (*AD* = *DB*), el centro *D* per radio *DC* desegnu cirklon, kiu tranĉas la bazan linion en *E*. Prenu en cirkelon la longon *EB*, centrigu alterne en *A* kaj *B* kaj faru cirklojn, kiuj intersekciĝas en *F* (*AB* = *FG* = *FH* = *AG* = *BH*).

Fig. 4. Sen cirkelo kaj liniilo oni povas ankaŭ atingi iom kontentigan rezultaton, ligante mallarĝan paperrubandon kiel nodon, kiun oni regule kuntiras kaj platpremas. Fortranĉante la nefalditajn pecojn, oni kunigas per krajono la kvin pintojn.

ORBIS PICTUS — LA MONDO EN BILDOJ.

(*J. A. Komenský — Comenius: 1654.*).

ČLOVĚK. Adam, první člověk, stvořen jest šestého dne stvoření světa od Boha dle obrazu Božího z hroudy země, a pak Eva, první žena, utvořena jest ze žebra mužova. Tito prvostvořenci, od ďábla v podobě hada byvše svedeni, aby jedli z ovoce stromu zakázaného, odsouzeni jsou k bídě a smrti s celým svým potomstvem a vyhnáni z ráje.

***LA HOMO.** Adamo, la unua homo, estis kreita la sesan tagon de la mondokreo de Dio laŭ bildo de Dio el terbulo, kaj poste Evo, la unua*

virino, estas kreita el ripo de la viro. Ĉi tiuj unuekreitoj, estinte delogitaj de diablo en figuro de serpento, ke ili manĝu el fruktoj de arbo malpermesita, estas kondamnitaj al mizero kaj al morto kun sia tuta posteŭlaro kaj elpelitaj el la paradizo.

TĚLO LIDSKÉ. Na lidském těle nejvýše jest hlava, jejíž přední část sluje obličej, zadní lebka. Níže spatřujeme trup, na němž jest viděti krk, jehož přední část jest hrdlo, zadní šíje; dále hruď, mající napřed prsa, vzadu hřbet s lopatkama a pod nimi bedra; posléze břicho, po jehož stranách jsou slabiny a kyčle. Po stranách trupu jsou paže, na nichžto rozeznáváme: rameno, loket, zápěstí a ruku. Dole jsou nohy, na nichž pozorujeme: stehno, koleno, holeň s lýtkem, kotníky a chodidlo. Celé tělo pokryto jest koží.

LA HOMA KORPO. Sur la homa korpo plej alte estas la kapo, kies antaŭa parto estas nomata vizaĝo, malantaŭa kranio. Pli malsupre ni vidas trunkon, sur kiu estas videbla kolo, kies antaŭa parto estas gorĝo, malantaŭa nuko; plue brustkorbo, havanta antaŭe bruston, malantaŭe spinon kun skapoloj kaj sub ili lumbon; fine ventro, je kies flankoj estas ingvenoj kaj koksoj. Je flankoj de la trunko estas brakoj, sur kiuj ni distingas: akselon, kubuton, manradikon kaj manon. Malsupre estas kruroj, sur kiuj ni rimarkas: femuron genuon, tibion kun tibikarno, maleolojn kaj piedplandon. La tuta korpo estas kovrita de haŭto.

Korekto. En la n-o 5. legu sur la pĝ. 74. linio 11: *irido* (anstataŭ *iriso*), *di.nto* (anstataŭ *kariofilo*). (*Daŭrigo.*)

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Klub Esperantistů **v Rakovníku** pořádá dne 20. a 27. července 1913 v místnostech školní budovy v **Kněževsi VÝSTAVKU** esperantské literatury, pohlednic a známek z celého světa a různých předmětů získaných Esperantem. Od 9—12 a 2—6. Vstupné 20 h.; školní děti 10 h. Obecní úřad v Kněževsi subvencoval výstavku 10 K. Bohatá sbírka pohlednic obsahuje 2500 kusů. Doufáme, že stane se Kněževes dostaveníčkem přátel našeho hnutí (z Rakovníka, Loun, Slaného, Plzně, Kladna atd.) a těšíme se, že i z Prahy zavítají tam někteří Esperantisté ke společné návštěvě této výstavky.

Do knihovny Svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj" byly přijaty následující knihy (viz seznamy v roč. III, IV., V. a VI.):

č. 130. 1. *La Premiito.* orig. novelo de Herschel S. Hall (24 str.)
2. *Tra la loko ensorĉita,* orig. novelo de J. Ŝirjaev (15 str.).
č. 131. C. Aymonier-R. Ferter: *Pri Esperanto. Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de Ido proponitaj* (68 str.).
č. 132. Dr. St. Schulhof: *Aŭtunaj floroj*; dek originalaj poemoj (29 str.).
č. 133. Edm. Privat: *Kursa lernolibro de Esperanto* (64 str.).
č. 134. Edm. Privat: *Ginevra.* Orig. triakta dramo (48 str.).
č. 135. Craven-Gego: *La kamena angulo*; familia dramo en 2 aktoj (49 str.).
č. 136. Z. Adam: *Historio de Esperanto 1887—1912* (144 str.).
č. 137. B. Kotzin: *Historio kaj teorio de Ido* (142 str.)

Adresa knihovnika: Sinjorino Eliška Kočvarová en Rokycany, 33

Dne 1. VI. podrobil se před zkušební komisí Ústř. Svazu B. U. E. nižší zkoušce ze znalosti Esperanta p. Adolf Kraml z Plzně a byl uznán velmi způsobilým. (Dosud podstoupilo zkoušku 41 kandidátů.)

Regiona kongreso de Esperantistoj el Silezio kaj Moravio havis lokon en **Moravská Ostrava** (dimanĉon, la 6. VII. dum granda festo de Sokolaro) kaj partoprenis ĝin 40 gastoj. Honora prezid. estis nomita s-o konsilanto dr. V. Rosický, prezid. s-o Ferd. Kučera, el M. Ostrava, vicprez. s-o J. Bárta el Poruba-Silezio kaj s-o instr. Valoušek el Královo Pole-Moravio, sekr. s-o Fr. Stachura el Polská Ostrava. Kiel delegito de B. U. E. ĉeestis f-ino Fr. Procházková el Praha; en nomo de Poloj parolis s-o A. Bartulec el Karvín. Post tralego de vico da salutleteroj kaj telegramoj parolis s-o Frant. Dvorník pri „Signifo de Esperanto por la bohema nacio"; lian aprobe aplaŭditan paroladon sekvis viva debato. Estis esprimita propono prezentota al ĝenerala kunveno de B. U. E., ke tiu ĉi organizu en Praha slavan kongreson esperantistan en 1915.

